## [INSTRU-GERMAN] 2012: KER-EKZAMENOJ KAJ LINGVOKURSOJ EN HERZBERG

La 9an de junio 2012 okazos UEA-ITK KER-ekzamenoj, la unuan fojon la SKRIBA parto samtempe dise en la mondo. Tio signifas, ke paralele povos okazi ekzamenoj en B1, B2 kaj C1 niveloj en pluraj urboj, en pluraj Esperanto-grupoj. La jam anoncitaj ekzamenlokoj estas videblaj ĉi tie: http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj

GRAVE: en Herzberg am Harz okazos ANKAŬ la PAROLA parto, do kompleksaj ekzamenoj en ĉiuj tri niveloj!:

Do laŭ datoj la lingvokursoj okazos ĝis julio 2012: februaro 3-5, aprilo 27- majo 01, junio 7-10 (kompleksaj (skribaj+parolaj) B1, B2 kaj C1 ekzamenoj). La ekzamentago estos la 9a de junio 2012.

Pri la kondiĉoj vi povas legi pli da informoj ĉe la paĝo: http://edukado.net/novajhoj?id=186

Por inspiriĝi spektu kiel varbas por la ekzamenoj la konata Esperanto-kantisto: JoMo: http://www.youtube.com/watch?v=8qQolY9h9a0

La jarkalendaron de Interkultura Centro Herzberg vi trovas ĉe http://esperanto-urbo.de/

Al la lingvokursoj kaj al la ekzameno vi pvovas aliĝi ĉe

Zsofia Korody

Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg

37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6

zsofia.korody ĉe esperanto.de

## PREZENTO DE LA 4 APERINTAJ DISKOJ ĈE VINILKOSMO EN LA RETEJO DE "LA BALTA ONDO"

Mi invitas vin vidi ĉi tie la prezenton de la 4 aperintaj diskoj ĉe Vinilkosmo en la retejo de "La Balta Ondo" http://sezonoj.ru/2011/12/flo206

Donaci diskojn por la jarfinfestoj estas bona ago por subteni esperanto-muzikon, la esperanto-artistojn kaj Vinilkosmo-n

Antaŭdankojn kaj plej muzikajn bondezirojn !

Flo !

## [BAVELETO] INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO 19.05.2012 - 25.05.2012 EN HERZBERG AM HARZ - LA ESPERANTO-URBO

La Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso (IFK) estas unu el la plej grandaj Esperanto-Kongresoj.

Temas pri unika internacia kongreso, ne nur por fervojistoj. Ni atendos 150 - 200 gepartoprenontojn el ĉ. 20 landoj!

Ĝi okazos de la 19a ĝis la 25a de majo 2012 en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo (Germanio).

Granda kulturprogramo kun interesaj ekskursoj atendos vin. Ĝuu la specialan urban Esperanto-atmosferon kaj vizitu la plej belajn lokojn de la regiono, de la Harz-montaro.

Ankaŭ ni ofertas etan antaŭkongreson (16.05.2012 - 19.05.2012) kun migradoj kaj ekskursoj. La postkongreso (GEK) okazos dum pentekosto 2012 en Berlin-Lichtenberg.

La specialan IFK-hejmpaĝon kun elektronika aliĝilo vi trovas sub: http://ifk64.esperanto-urbo.de

Bv. baldaŭ aliĝi, ĉar ni volas ĉion bonorde prepari. Dekoj da aliĝintoj jam elektis por si ekskursojn, tranoktadon. LKK helpos al vi, se vi havas demandojn.

Ne forgesu: la kotizoj altiĝos ekde februaro 2012!

Amike kaj samideane salutas via surloka LKK

Petro Zilvar Zsofia Korody kaj la ICH-teamo

## TEJO SUBTENAS LA KAMPANJON DE FOJE (EUROPEAN YOUTH FORUM) POR SENDEPENDA PROGRAMO PRI "JUNULARA AGADO".

KIEN VI IRAS?

Dum krizoj kaj periodoj ekonomie severaj, junuloj bezonas ne afablajn vortojn sed fortan investadon. Junuloj devas esti politika kaj financa prioritato por Eŭropo.

Ni petos de la Eŭropa Parlamento kaj de la ŝtatmembroj de EU fortan kaj sendependan programon pri "Junulara Agado" por neformala lernado, porjunulara laboro kaj demokratiaj porjunularaj organizoj kaj ambician planon pri junulara dungado. Junuloj kaj ties organizoj meritas almenaŭ tion! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1399

## TEJO SERĈAS VOLONTULON!

TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. TEJO-volontulo devas preti labori dum 6-9 monatoj (pli aŭ malpli longa daŭro esceptokaze eblas) ekde januaro/februaro (preciza dato laŭ interkonsento). La limdato por sendi vian kandidatiĝon estas la 28a de decembro 2011. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1399

## NOVA ELDONO DE LA NOVAĴLETERO "LA RIVEREGO" DE ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA APERIS

La novaĵletero troveblas en la sekva retpaĝo: http://www.esperanto.qc.ca/eo/riverego

## TEATRO-STAĜO DE LA 7-A ĜIS LA 17-A DE JULIO 2012 EN MINSKO, BELARUSIO

Teatra staĝo en Esperanto, en kiu Esperanto ne estas celo, sed ilo !

Malkovru rusajn kulturon kaj teatron

Vizitu Vilnon kaj vivu 10 tagojn en Minsko

Partoprenu frenezan travivaĵon

La sistemo de Stanislavski adaptita en Esperanto

Plibonigu vian scipovon de Esperanto

Venu ludi spektalon dum Kongreso de EEU

Malkovru Irlandon kaj ĝiajn pejzaĝojn

Ni invitas vin partporeni dektagan intensan staĝon laŭ tradicia rusa metodo de Stanislavski kun multaj instruistoj kaj diversaj kursoj: improvizata teatro, scena esprimado, klakdancado, parolprononcado, kantado, bio-mekaniko...

La staĝo akceptas komencantojn kaj profesiulojn de teatro, kiuj estos gvidataj de spertaj instruistoj de la Akademio de Artoj de Minsko en la rusa lingvo. Samtempa interpretado al Esperanto, permesos al vi plene malkovri la teatro-lernadon tiel, kiel oni instruas ĝin en rusparolantaj landoj.

Je la fino de la staĝo okazos spektaklo por la publiko. Poste ni proponas al vi veturi kune al Galivo en Irlando por ludi esperantan spektaklon dum la EEU-kongreso 2012. La spektaklo utiligos la ekzercojn kaj verkojn ellaboritajn dum la staĝo.

Instruistoj, sendu viajn gelernantojn sperti esperanton !

Kosto laŭ la dato de via aliĝo:

300 € ĝis la 15-a de februaro 2012, 350 € ĝis la 15-a de aprilo 2012, 400 € post la 16-a de aprilo 2012

Asocio MORGAŬ LA PRINTEMPO

http://www.morgaulaprintempo.eu

morgau.la.printempo ĉe gmail.com

14 rue de la Tour d'Auvergne

75009 Paris

Francio

tel : +33 142 813 396

## [ESPERANTISTOJ] JULA INFORMLETERO DE VINILKOSMO N-RO 32

Jula Informletero de Vinilkosmo n-ro 32 pri aktuala esperanto-muziko.

Legu ĝin ĉi tie : http://www.ipernity.com/vinilkosmo/364844

## DANKLETERO OKAZE DE LA 10-JARIĜO DE EDUKADO.NET

Katalin Kovats kore dankas kaj raportas pri edukado.net. Legu pli: http://edukado.net/novajhoj?id=197

## VENONTAJ RENKONTIĜOJ

Komune festi la Novan Jaron: 10-a Novjara Renkontiĝo kaj 3-a Novjara Internacia Semajno, Bitburg/Germanio, de la 27-a de decembro 2011 ĝis la 3-a de januaro 2012 http://www.esperantoland.org/nr

28-a Internacia Festivalo - en Xanten - internacia etoso - renoma aranĝo - alloga programo, 27.12.2011 ĝis 3.1.2012, Germanio http://www.internacia-festivalo.de

JES: 27a de decembro 2011 ĝis 1a de januaro 2012, Gdansk, Pollando http://jes.pej.pl/

Jarfina Festo+Silvestra Festeno == 27.dec-02.jan.2012 == en franca E-kastelo Greziljono http://gresillon.org/jarfino

Seminario SANO-2 (28.12.11 - 02.01.12) en Herzberg - la Esperanto-urbo http://esperanto-urbo.de (multlingva)

2012

NOVA - Novjara Aranĝo de BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo) inter la 11-a kaj la 15-a de januaro 2012, Formiga, subŝtato Minas-Ĝerajso, Brazilo http://novjaraaranĝo.wordpress.com

32-a BEJK, Brazila Esperantista Junulara Kongreso, inter la 15-a kaj la 19-a de januaro 2012, Taguatinga, Brazilo http://www.bejo.esperanto.org.br/

70a Regiona Staĝo de Esperanto, 23 / 24 / 25-an de marto 2012, LA PETITE PIERRE, Francio http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr

28a Printempa Semajno Internacia (PSI), 2a ĝis 9a de aprilo en Bonn, Germanio http://esperanto.de/psi

IJF - Internacia Junulara Festivalo 2012, 4a de aprilo ĝis 10a de aprilo 2012, Cattolica, Italio http://iej.esperanto.it/ijf/2012

PRINTEMPE 2012, ĉ. 5-a ĝis 12-a de aprilo 2012 http://www.esperantoland.org/printempe

Krokodila Renkontiĝo, 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2012, Arrout, suda Francio / Okcitanio http://krokodila2012.wordpress.com/ aŭ krokodila2012 ĉe gmail.com

9-a kongreso de EEU 2012, 16a ĝis 20a de julio 2012, Galivo, Irlando http://eeu-kongreso.webnode.com/

Hanoja UK de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012 http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=413#2

IJK 2012, 5a ĝis 12a de aŭgusto 2012 en Nara, Japanio http://www.tejo.org/ijk

79a Kongreso de Esperanto 18a ĝis 25a de aŭgusto 2012, Mazaradelvalo, Sicilujo, Italujo http://kongreso.esperanto.it/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu